


Sukero iĝas oro en Burundo

28a jarkolekto - februaro 2007/2

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijs - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X



Vizito al Takahaŝi

Pedalante al Jerusalemo

**15 jarojn post la
pereo de la imperio**



Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

15 jarojn post la pereco de la imperio

Tuj post la disfalo de Sovetio Jegor Gajdar respondecis pri la ekonomia politiko en la unua registaro de sendependa Rusio. Li mem nomis sian postenon kamikaza, kaj sendube pravis.



7

POLITIKO

Burundo.....9

Kie sukero iĝas oro

MODERNA VIVO

Turismo.....11

Ferioj pli kaj pli foraj

Albanio11

Edziniĝo - al mortinto

Bestoj.....11

Delikate ...

Granda sumo, malgranda aparato11

TURISMO

Japanio12

Vizito al Takahaŝi

LINGVO

Opinio14

La karaktero de la ĉina lingvo kaj la sekvoj por Esperanto

SPIRITA VIVO

Kredo kaj angla lingvo15

Mia estrino estas vampiro17

Pilgrimado18

Pedalante al Jerusalemo

LIBROJ

Kial malestimo je la afrika medicino?19

Irigu vin tra intrigo vintra20

NOVELO

Sekretoj de la konfesejo21

Abonoj4

Enkonduko5

Leteroj.....6

El mia vidpunkto.....7

Anoncetoj.....23

Kie sukero iĝas oro

En 2005 burundanoj elektis novan registaran partion. Venkis CNDD-FDD, ĉar elektantoj opiniis, ke nur tiu ĉi partio kapablos plenumi popolajn postulojn.



Tamen neniu povis imagi la nunan situacion en Burundo. Ankoraŭ mankas paco, sekureco kaj libereco. Enkarcerigitaj estas ĵurnalistoj kaj opoziciuloj, kaj malliberulojn murdas policianoj. Pro malsato mortas la popolo; sukero, grandkvante produktata en Burundo, iĝas kvazaŭ oro. Prezroj en vendejoj altiĝas pro impostoj kaj pro korupto de la flanko de ŝtataj aŭtoritatoj.

9

Vizito al Takahaŝi

En la sud-japana prefektujo Okajama situas urbo Takahaŝi. En ĝi loĝas miaj Esperanto-amikoj gesinjoroj Miajatani, kiuj invitis min kaj mian edzinon gasti ĉe ili kaj ekkoni la vidindaĵojn de ties urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Profitante ilian afablecon, ni akceptis la inviton.



12

Pedalante al Jerusalemo

Pilgrimuloj ili estis, certe, kaj ankaŭ provizitaj per moderna armilo, nome biciklo. Kunveninte el diversaj landoj, ili renkontiĝis en Milano por dudek ses etapoj, tri mil kvincent kilometroj, tridektaga biciklado. Estis grupo bicikle pilgrimanta, kiu en sia vojaĝo tra pluraj landoj esperis postlasi ĉie survoje, sed precipe ankaŭ en la celataj regionoj de Israelo kaj Palestino mem, sian pac-mesaĝon, kiu enhave estas identa kun la pac-mesaĝo, kiu unuafoje estis anoncita ĝuste en tiuj partoj de la mondo.

18

Vizitu
www.Monato.net
kun novaj kontribuoj ĉiutage!

Senpagan pasvorton por viziti la paĝojn vi petu de monato@monato.net.
Menciu vian FEL-kodon, kiun vi trovos supre sur la adreŝlipo.

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be (ebblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratisita je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifo

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	26	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	56	5	9
Brazilo	EUR	23	26	5	9
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	26	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	26	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	45	5	9
Hungario	EUR	23	26	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	45	5	9
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6900	7300	860	1260
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	45	5	9
Kroatio	EUR	23	26	5	9
Latvio	EUR	23	26	5	9
Litovio	EUR	23	26	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	390	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalo	EUR	37	41	5	9
Rusio	EUR	23	26	5	9
Singapuro	EUR	41	45	5	10
Slovakio	EUR	23	26	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	46	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	74	81	9	14
Tajvano	EUR	41	45	5	9
Usono	USD	61	65	8	13
Baza tarifo	EUR	46	50	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelsö, 5 Craighill Road, Kincadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel. 01555 759 166. Reto: davekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - **Hilde** Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
 - **Literatura-Servo "Espero",** Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Graftschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
 - **Hans** Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - **Wolfgang** Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japania:** Japania Esperanto-Instituto, Wa-
- sedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: esperant@unitel.co.kr
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: laimius@fastlink.lt.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8042. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - **Halina** R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - **Mikaelo** Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - **Esperanto-Skolan,** Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - **Sveda Esperanto-Federacio,** c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleeodorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org



Malflugemo

Mi neniam ŝatis flugadon, sed nun, post plej freŝa sperto, mi decidis definitive ne plu flugi. Oni invitis min prelegi dum kataluna Esperanto-kongreso; mi akceptis, kaj ĉar la distanco inter Aŭgsburgo kaj Barcelono estas sufiĉe longa, ni flugis, uzante la servon de la germana kompanio *Lufthansa*. Ŝajnis al mi, ke mi eltenos, ĉar la flugdaŭro de Munkeno al la kataluna ĉefurbo estas malpli ol du horoj. Sed mi konstatis, ke oni evidente faras ĉion por fortimigi min de flugvojaĝado. Kvazaŭ ne jam sufiĉus la kutimaj torturaĵoj, kiel sidi en mallarĝaj seĝoj sen la eblo libere moviĝi – eĉ stari ne eblas, ĉar mi frapus la kapon kontraŭ la malalta plafono! – oni inventas pliajn malkomfortaĵojn.

Kiam ni alvenis ĉe la giĉeto de *Lufthansa* tie staris gardistoj, kiuj instruis al ni, ke por havigi niajn flugbiletojn, ni devas manipuli komputilan aŭtomaton. „Vi devas unue enŝovi vian kreditkarton,” diris la uniformulino. „Sed mi jam pagis mian flugon, kial mi do bezonas kreditkarton, kiun mi ne havas?” demande mi respondis. Oni klarigis, ke tio necesas nur por identigi min (?), kaj montriĝis, ke mian ordinaran bankokarton la inteligenta aŭtomato ne akceptas. Do ni devis stari en longega vico de senkreditkartuloj por ricevi nian biletan. Ni sentis nin parioj. Kaj mi estas certa, ke post kelka tempo ankaŭ tiuj konsilantoj estos malaperintaj, kaj pasaĝeroj staros sen iu helpo antaŭ tiuj stultaj aŭtomatoj, kiuj kompreneble kostas malpli ol dungitaj homoj. Pro severaj kontroloj pro historio pri terorismo ni estis traktitaj kiel krimuloj arestatataj: mi devis elpoŝigi ĉion, eĉ miajn paperajn naktuketojn (povus ja kaŝiĝi bombo inter ili). En la flughaveno de Barcelono la sekuristo insistis krome, ke mi demetu mian pantalonon rimenon. Bonŝance en Katalunio ni tiom bone manĝis, ke mia pantolono ne falis de sur malplena ventro ...

Jen nur kelkaj detaloj, kiuj ĉagrenis min tiel, ke mi decidis rezigni pri flugado. En mia aĝo tio eblas; mi ne plu devas uzi avion, ĉar kiel pensiulo longdistancajn vojaĝojn mi ne bezonas entrepreni (ekzemple pro profesiaj kialoj). Ankaŭ antaŭe mi provis eviti flugadon, ĉar la maŝinoj tre ege poluas la atmosferon, sed nun oni detruas ankaŭ mian dignon. Se vi do volas inviti min, konsideru, ke mi venos nur per trajno aŭ ŝipo kaj do bezonos longan tempon. Ĝis tiam!

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukaĵoj); represoj kaj tradukaĵoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retro: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alós i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandsprese, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandsprese, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Serioze revizii la historion

Kun intereso mi legis la artikolon pri religioj en Bulgario (MONATO 2006/12, p. 24-25), tamen mi malkonsentas pri ĝiaj vidpunktoj. La aŭtoro sekvas la tradician opinion, ke en Bulgario estas unu tradicia religio (ortodoksa kristanismo). Li klarigas, ke islamo alvenis en la landon ĉefe pro perforto kaj ankaŭ „pro ekonomiaj konsideroj”. Kvazaŭ tio ne estus okazinta pri kristanismo. Cetere, la grado de perforto en la alprenado de islamo estas diskutinda, kaj certe la grado de perforto en la kristanigo de la lando post la sendependiĝo estas pli ol evidenta: la kvanto de islamanoj de 1878 ĝis hodiaŭ falis de proksimume duono de la loĝantaro al nunaj 10 %. Lasta epizodo de tiu perfortado estis la amas-forpeloj de junio kaj julio 1989, kiam 300 000 islamanoj estis puŝitaj en Turkion.

Aliflanke, la konsidero, ke unu religio estas pli tradicia en la lando, ĉar ĝi estis oficialigita antaŭ 1100 jaroj dum alia „nur” antaŭ 600, estas pli ol diskutinda. Sub ĝi kaŝiĝas la koncepto de unueta ŝtato, kiu fajrigis Balkanion en la lastaj 200 jaroj. Pri tio mi permesas al mi diri, ke la otomana imperio, dum la plej granda parto de sia ekzisto, estis multe pli permesema, multe pli, ol samepokaj okcident-eŭropaj kristanaj ŝtatoj (pri tio spertas ekzemple preskaŭ ĉiuj bulgaraj judoj, kies prapatroj tie trovis rifuĝon post sia forpelo el Iberio). Estus dezirinde, ke bulgaroj – kiel aliaj balkanaj popoloj – tre serioze reviziu sian historion kaj elsarku el ĝi naciismajn mitojn kovantajn novajn konfliktojn. Interalie, la pritrakto de la 500-jara otomana regado en la bulgaraj lernolibroj estas ege unuflanka, manka de ĉia nuanco kaj ofte ofenda por islamaj bulgarianoj (kaj aparte por la etne turkaj).

Laste, sed ne balaste, trois al mi pluraj adjektivoj. La aŭtoro parolas pri „moderaj ŝijaistoj”, dum li ne distingas inter „moderaj” kaj „fundamentismaj” kristanoj – kaj tamen ili ja ekzistas. Li timas pri tio, ke kelkaj islamanoj vizitas privatajn nelaikajn lernejojn, sed tion ja faras ankaŭ kristanoj. Li timas, ke piaj islamanoj iras studi eksterlanden, sed ankaŭ ja tion faras kristanoj. Mi ne subtaksas la danĝeron de eventuala enŝteliĝo de perfortema islama fundamentismo en Bulgarijon, sed mi

certas, ke plena akceptado de la samlegitimeco de ĉiaj kredoj en la lando kaj aparta rehonorigo de islamanoj, mistraktataj kaj diskriminaciataj dum pli ol unu jarcento, estas la plej solida sekurigilo por Bulgario.

Hektor ALOS I FONT
Katalunio

Toleremo kaj la rajto insulti

Post longa silento redaktoro-pastoro Gerrit Berveling denove kaj pli amplekse (MONATO 2006/12, p. 22-23) esprimas sian konsterniĝon pri la propra konstato, ke faktoj povas esti interpretataj kiel insultoj. Li mencias ne nur membrojn de religio(j), sed ankaŭ „membrojn de neniu religio”. Ĉu? Por la granda disa grupo de „kleruloj”, do por tiuj, kiuj kapablas, per ĝusta uzado de akiritaj scioj, klare juĝi aferojn (inkluzive anojn de agnoskismo), estas insulto, ke membroj de religioj tiel priskribas ilin negative. Kvazaŭ ili ne havus multvaloran monorigardon kaj ege altnivelan kaj respektindan moralon. Kvazaŭ kredi estus la sola, evidenta kaj decidita vivsinteno en la mondo.

Lastatempe kredantoj instigas al „interreligia dialogo”. Prave, sed kial ne al „interhoma dialogo”, kune kun kleruloj? Ĉu pro malaprobo aŭ pro kontraŭtempo? Por ĉiuj kleruloj estas insulto esti konsiderataj kiel moralaj kaj spiritalaj lepruloj, eĉ ne menciindaj en la rondoj de „grandaj” religioj. Islamanoj eĉ aŭdacas konsideri klerulojn kiel estaĵojn malpli respektindajn ol hundoj kaj porkoj. Kiu do insultas kiun?

Ĉiel ajn, tiaj faktoj estas por mi pli ŝokaj ol proponi la pacpremion al Hirsi Ali.

Bert BOON
Belgio

Pacprocezo, ne kapitulaca procezo

Mi tute malkonsentas kun la fina verdikto de Santiago López Fernández-Aguado en lia artikolo pri la eŭska pacprocezo (MONATO, 2006/12, p. 8). Li diras, ke verŝajne oni ne progresos ĝis ETA transdonos ĉiujn armilojn kaj ĝis *Batasuna* publike kondamnos perforton. Do laŭ la aŭtoro paco ne alvenos ĝis unu el la du flankoj implikitaj en la konflikto

komplete kaj sen kondiĉoj kapitulacos. Do kial ne diri, ke verŝajne oni ne progresos ĝis la hispana polico ĉesos torturi la eŭskajn prizonulojn, ĝis ĉi tiuj prizonuloj estos transloĝigitaj al eŭskaj malliberejoj kaj ĝis la memdecida rajto por Eŭskio estos agnoskita de la hispana registaro?

Kio okazas en Eŭskio nuntempe, estas pacprocezo, ne kapitulaca procezo, fare de unu el la du flankoj implikitaj en la konflikto, kaj en pacprocezoj, se oni volas atingi pacon, neniu flanko povas tute altrudi siajn kondiĉojn.

Enbor BARRUETABEÑA
Eŭskio

Ne plu serĉu!

Gbeglo Koffi serĉas nomon por sia „religio” (MONATO 2006/12, p. 26). Ne plu serĉu! Tiu, kiu volas „vivi en harmonio kun la naturo”, kiu opinias, ke la nomoj de religioj „naskas disputojn”, ke „ne vorojn ni bezonas por ligi nin kun aliaj estuloj/estaĵoj ... sed niajn sintenojn/agojn, por ke ni estu utilaj al ĉiuj”, estas humanisto. Humanisto estas tiu, kiu en sia vivo centras homojn, ne diojn; racion, ne superstiĉon; faktojn, ne fantaziojn. Opini-enketoj en mia lando (ekzemple la plejlasta, de *Ipsos MORI*, en novembro 2006) indikas, ke la plimulto de la popolo humanisme pensas (ĉu agas, kiel ĉe ĉiuj konfesioj, estas alia afero). Ofte, tamen, kiel Gbeglo Koffi, homoj ne scias, kiel ĝuste etikedi siajn opiniojn – per humanismo.

Paul GUBBINS
Britio

Propono al ĉiuj politikistoj

Kompreneble, mi tute konsentas kun Stefan Maul (MONATO 2006/12, p. 5) kaj mi faras proponon al ĉiuj politikistoj, lingvistoj, instruistoj ktp, kiuj favoras lernadon de la angla lingvo (eĉ pli ĝenerale, de nacia lingvo): *Iru ĝis la fina etapo de via ideo, kuraĝu proponi, ke ĉiujn lingvojn krom la angla oni tuj ĉesu instrui, kaj tion en ĉiuj partoj de la tero. Ĉar fakte ĉiu povas konstati, ke tio tre baldaŭ (post 50 jaroj maksimume) okazos, se ni daŭrigas laŭ la vojo kaj la maniero nunaj. Kion tiuj homoj respondus?*

Louis ENSUQUE
Francio

15 jarojn post la pereco de la imperio

de Kalle KNIIVILÄ

ALEX ZELENKO

Tuj post la disfalo de Sovetio Jegor Gajdar respondecis pri la ekonomia politiko en la unua registaro de sendependa Rusio. Li mem nomis sian postenon kamikaza, kaj sendube pravis. Nuntempe popolistoj en Rusio ŝatas malbeni la nomojn de la tiutempaj „junaj reformistoj”, kaj kulpigi ilin, kune kun Miĥail Gorbaĉov, pri la kraŝo de la imperio. Kaj malantaŭ ili, kompreneble, staris la malamikaj okcidentaj landoj, kiuj konspiris por pereigi la karmemoran Union de Sovetiaj Socialismaj Respublikoj.

Pri tiu disfalo de superpotenco Jegor Gajdar nun verkis esploron. La recenzo de lia nova libro en la retejo de la ekonomia periodaĵo *Ekspert* tuj naskis longan retdiskuton. Jam la unua diskutanto donis la tonon: „Gajdar mem ja estas marŝanta klarigo pri pereco de la imperio ... La libron li devis nomi *Mia sperto pri disfalo de imperio*.”

En sia verko *Гибель империи - уроки для современной России* (La pereco de la imperio - lecionoj por la nuntempa Ru-

sio), aperinta en junio 2006, Jegor Gajdar konvinke, kun multaj citaĵoj el oficiala korespondo de la sovetia tempo, montras ke la konspir-teorioj nuntempe furorantaj en

Rusio, estas nuraj mitoj – sed ja mitoj tipaj por la postimperia intelekta etoso, kaj tute kompareblaj kun la fama ponarda legendo en Germanio post la unua mondmilito. ►

Jegor Gajdar



ИНСТИТУТ ЭКОНОМИКИ ПЕРЕХОДНОГО ПЕРИОДА



Unua renkontiĝo inter la usona prezidento Ronald Reagan kaj la tiama ĝenerala sovetia sekretario Miĥail Gorbaĉov, en Svislando la 19an de novembro 1985

Sovetio ne estis intence disfalgita de okcidentaj landoj, kiel multaj kredantoj je la nova rusa ponard-legendo asertadas. Eĉ male, Jegor Gajdar montras en sia libro, ke gravaj aktoroj en la ekstera mondo nepre volis, ke Sovetio pluekzistu, prefere en demokratia formo, kompreneble – por eviti la riskon de interna milito en lando kun nukleaj armiloj. Tiun deziron klare esprimis ankaŭ prezidento Bush (la patro) dum vizito en Ukrainio somere 1991, tuj antaŭ la efektiva disfalo de la sovetia imperio.

La veraj kialoj de la pereco estis kompreneble tute aliaj, kaj inter ili elstaras la katastrofa evoluo de la sovetia ekonomio. Sovetio ne estis stabila, ekonomie forta grandpotenco, kiel ŝatas aserti la nuntempaj rusaj imperiistoj, sed enorma ŝanceliĝanta konstruaĵo sur misa fundamento, kies disfalo estis nur demando pri tempo. La alta prezo de nafto en la komenco de la 1980aj jaroj donis al Sovetio tempon provi solvi iujn el la internaj problemoj, sed anstataŭ ŝanĝi ion, la partiestroj nur sidis sur sia trono.

La kernon de la problemoj Gajdar vidas jam en la kolektivigo de la terkulturado en la 1920aj jaroj kaj la industriiga politiko de Stalin, ĉar tiu politiko baziĝis sur perforta malriĉigo kaj sklavigo de la kamparo. Komence tio eblis, ĉar la proporcio de urboj estis negranda, sed la kreskantaj urboj bezonis ĉiam pli da terkulturaj produktoj, kaj post la 2a mondmilito necesis fari ion radikalan por solvi la problemon.

La partio ne volis aŭ ne kuraĝis liberigi la kamparon kaj uzi merkatajn metodojn por pliiĝi la produktadon de manĝaĵoj. Anstataŭe oni uzis la kutimajn plan-ekonomiajn rimedojn, kaj decidis ekkulturi novajn, antaŭe neuzitajn terenojn en malpli fekundaj partoj de la lando. Tie oni fondis novajn ŝtatajn bienojn, kiuj estis dependaj ne nur de la malfavoraj veter-kondiĉoj, sed ankaŭ de ĉiam pli da ŝtataj investoj. La konsekvenco estis, ke Sovetio iĝis ĉiam pli dependa de importita greno. Samtempe

kun la importado de greno kreskis la eksportado de nafto. La ekonomia kaj politika stabileco de la lando iĝis ĉiam pli dependa de la prezoj de greno kaj nafto en la monda merkato.

La partiaj gvidantoj de Sovetio tamen ŝajne ne bone komprenis la kreskantan dependecon, kaj tute ne komprenis la naturon de la kapitalisma merkato de krudaĵoj. Male ol la prezoj de multaj aliaj varoj, la prezoj de krudaĵoj kiel nafto kaj greno povas tre akre kaj neantaŭvideble varii, atentigas Jegor Gajdar. Tial necesas sekurec-marĝenoj kaj stabiligaj fondusoj, sed tiaj tute mankis en Sovetio. Male, dum malbonaj rikolt-jaroj oni uzis ĉiam pli el la or-rezervo de Sovetio por aĉeti grenon eksterlande.

Kiam meze de la 1980aj jaroj la prezo de nafto draste sinkis, dum la prezo de greno estis sur nekutime alta nivelo, la rezulto estis katastrofo. Baldaŭ ekmanis mono por importi, la sovetia registaro komencis pruntadi monon en eksterlando en daŭre kreskantaj kvantoj, kaj post kelkaj

jaroj la enspezoj el naftoeksporto apenaŭ sufiĉis por io plia ol pagado de la interezo.

Same kiel multaj aliaj industrioj en Sovetio, ankaŭ la naftoindustrio estis tute dependaj de importitaj maŝinpartoj, tuboj, kemiaĵoj kaj aliaj varoj, kiujn la sovetia industrio ne povis mem produkti en sufiĉaj kvantoj. Kiam ekmanis valuto, en Sovetio malaperis ne nur manĝaĵoj kaj medikamentoj, sed ankaŭ la importaĵoj bezonataj por la subteno de funkcia naftoindustrio. Por kreskigi la valutajn enspezojn necesus kreskigi la eksporton de nafto, sed anstataŭe la produktado kaj eksporto de nafto daŭre malkreskis, pro manko de maŝinpartoj, pro manko de tuboj, kaj pro manko de laboremo ĉe la laboristoj, kiuj povis aĉeti ĉiam malpli por siaj daŭre senvalorigantaj sovetiaj rubloj.

Jam komence de la 80aj necesis drastaj reformoj por eviti la kompletan kraŝon de la sovetia ekonomio, sed tiaj reformoj estis politike neeblaj. Eĉ ĉirkaŭ la jaro 1990, kiam la katastrofa situacio jam estis videbla por ĉiuj, radikalaj merkataj reformoj ne povis esti entreprenitaj. Fine de la sovetia periodo Miĥail Gorbaĉov ĉirkaŭveturadis la mondon por almozpeti kelkcent milionojn en Seulo por la diplomatia rekono de Sud-Koreio, kelkcent milionojn en Kuvajto por la afabla sinteno de Sovetio dum la golfa milito, ankoraŭ iom ĉe Kohl por la redono de orienta Germanio, kaj por la forĵetinda armea materialo, kiun Sovetio afable lasis je la dispono de Germanio, kiam la soldatoj estis urĝe veturigataj hejmen. La valuto jam mankis ne nur por aĉeto de greno, mono eĉ ne sufiĉis por veturigi ĝin al Sovetio, kaj sovetiaj ŝipoj estis arestitaj en eksterlandaj havenoj pro nepagitaj fakturoj.

La farseca puĉo en aŭgusto 1991 ne povintus ŝanĝi la ekonomiajn realaĵojn eĉ se ĝi sukcesus. Sed anstataŭe okazis tio, kion la sovetiaj regantoj timis de ĉiam: la armeo rifuzis uzi siajn armilojn kontraŭ la popolo. Tio kun plena klareco montris, ke la sovetia centra potenco ne plu ekzistis, kaj ne pasis multaj monatoj antaŭ ol la ruĝa flago estis malhisita en Kremlo. Poste, jam en sendependa Rusio, la kamikaza teamo de Jegor Gajdar transprenis la sinkantan ŝipon kaj provis ĝin savi per sia malfruinta ŝoka terapio. Sed tio estas alia historio. ■

BURUNDO

Kie sukero iĝas oro

En 2005 burundanoj elektis novan registaran partion, la eks-ribelulan CNDD-FDD. Ĝi estas taskita restarigi demokration perditan post la morto en 1993 de la unua demokratie elektita prezidanto, Melchior Ndayaye.

Por burundanoj prioritatis paco, sekureco, libereco, justeco kaj demokratio. Venkis CNDD-FDD, ĉar elektantoj opiniis, ke nur tiu ĉi partio kapablos plenumi popolajn postulojn.

Tamen neniuj povis imagi la nunan situacion en Burundo. Ankoraŭ mankas paco, sekureco kaj libereco. Enkarcerigitaj estas ĵurnalistoj kaj opoziciuloj, kaj malliberulojn murdas policianoj. Pro malsato mortas la popolo; sukero, grandkvante produktata en Burundo, iĝas kvazaŭ oro. Prezoj en vendejoj altiĝas pro impostoj kaj pro korupto de la flanko de ŝtataj aŭtoritatoj.

Gravaj postenoj

Miksiĝas la roloj de la ŝtata kaj la partia prezidantoj. La prezidanto de CNDD-FDD kondukas, kvazaŭ li estus ŝtata prezidanto, nomumante homojn al gravaj postenoj kaj kaŭzante, ke ekŝiĝu la vicprezidentino, ĉar ŝi lin kritikis.

Dume la ŝtata prezidanto vojaĝas tra la mondo, ŝajnigante, ke regas en Burundo paco kaj sekureco kaj ke ĵurnalistoj plene liberas sin esprimi. Tamen li hipokritas. Tri ĵurnalistoj de privataj radio-stacioj (du el *Afrika Publika Radio* kaj unu, la direktoro, de *Radio*

Isanganiro) sidas en la centra malliberejo de Burundo, kune kun la eksprezidanto, eksvicprezidanto kaj opoziciuloj.

Léonce Ngendakumana, la prezidanto de la ĉefopozicia partio, diris: „Timigi ĵurnalistojn, malliberigi opoziciulojn kaj mensogi al la internacia komunumo, ke ĉio estas en ordo, ne venkiĝos en la venonta baloto post kvar jaroj. La sola maniero estas kunigi ĉiujn burundanojn por restarigi pacon.”

SABIYUMVA Jérémie/pg



Supre: Granda portreto de la prezidanto de Burundo en la internacia flughaveno.

Sube: Buĵumburo: malsato, altaj prezoj, mizero, korupto.



Kontribuojn por la rubriko Politiko de MONATO kunlaborantoj sendu al politiko@monato.net.

David Galadí-Enríquez
kaj Amri Wandel

La kosmo kaj ni

Galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo
(dua plivastigita eldono).

Vera manlibro pri teoria kaj praktika astronomio,
verkita de du profesiaj astronomoj.

224 paĝoj; ilustrita; bindita; 2005


Prezo ĉe FEL: 18 eŭroj + afranko
Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

butiko@fel.esperanto.be
www.retbutiko.net

aŭ ĉe via preferata libroservo

Premio Pirlot
2001

Poemaro pri la vivo




Poemaro pri feliĉo, pri
rememoroj, pri la naturo, multaj
eroj kun ekologia inspiro. Fine
poemoj pri malpaco, pri
poluado, pri komerco kaj
konsumado, pri atomenergio
kaj Eŭropo ankaŭ apartenas al
la penso de Rejna. Poezio tre
simpla, jen ritma, jen senritma.
Troveblas kelkaj aludoj al aliaj
poetoj en ŝiaj poemoj.
Rejna de Jong estas persista
poetino kun aparta voĉo. Plia
virina voĉo gravas, eĉ se voĉeto
modesta, minora.

Chris Declercq

Paĝoj: 76; 21 cm; vinktitaj;
Prezo: € 10,00

Informoj:
tlf. +32 234 34 00;
tfx. +32 233 54 33
rete: butiko@fel.esperanto.be
www.retbutiko.net

Furoro de 

TURISMO

Ferioj pli kaj pli foraj

Ordinara litovo ferias 28 tagojn jare. Kutime tio okazas dum someraj monatoj. Turismaj spertuloj rimarkas, ke post la aniĝo de Litovio en Eŭropa Unio kreskis je 30 % la nombro de feriantoj, kiuj direktas sin al landoj de Eŭropo. Aliaj ŝatataj lokoj estas Turkio, Egiptio kaj ceteraj afrikaj landoj.

Oni kalkulis, ke en 2006 ĉirkaŭ 200 000 litovoj feris eksterlande, precipe en Turkio, Hispanio kaj sur la greka insulo Kreto. En Litovio funkcias 238 turismaj agentejoj, rimarkinde granda nombro en malgranda lando. Sed malgraŭ tio, nur 3 % de la litovoj ripozas eksterlande, kompare kun 10 % de la germanoj.

LAST/pg



RONNIE GARCIA

ALBANIO

Edziniĝo – al mortinto

Eksterordinaran rimedon trovis la albanaj gefratoj Margjoni [marĝoni] por ekposedi domon kaj riĉaĵojn. La fratino Vjollca „edziniĝis” al mortinta fraŭlo, Jeton Bizhga [biĝga].

La gefratoj konis la fraŭlon kaj decidis profiti de lia morto. Falsinte dokumentojn, eble helpe de korupta oficisto, ili anoncis la geedziĝon de Vjollca kun Jeton, por ke la fratino fariĝu la sola heredonto. Tamen la patro de la mortinto, surprizita pro la „edziĝo”, denunciis la aferon al la polico. Montris enketoj, ke Bizhga mortis antaŭ la dato de la „geedziĝo”. Nun la gefratoj estas akuzitaj pro falsado de oficialaj dokumentoj.

Bardhyl SELIMI

BESTOJ

Delikate ...

Kiel kontraŭleĝe veturi al fora lando kaj tamen tie esti gastame akceptata? La respondo simplas, kiam oni estas kato. En novembro pasintjare havenlaboristoj en la brita urbo Liverpolo miris, kiam en kontenero el Hajfo (Israelo) ili trovis blankan katon. La kvarpiedulo estis ŝlosita sen nutraĵo kaj akvo dum 17 tagnoktoj kaj tamen restis viva.

Malfacile estis kapti la katon sed post kvin horoj fiŝodoro eligis la bes-



Tiu ĉi blankulo nigre veturis al Britio.

ton el ĝia kaŝejo. Veterinaro kontrolis la katon, kiu sata kaj feliĉa kvarante-nis. En Israelo per gazeto-anoncoj oni serĉis la posedanton.

AMik

Granda sumo, malgranda aparato

La plej grandan subvencion dum la historio de israela scienco, 1,75 milionoj da eŭroj, ricevis 31-jara kuracisto Hossam Haick pro aparato kapabla laŭ odoro diagnozi pulmkanceron.

La mono, el Eŭropa Unio, ebligis

fondi esplorkonatorion kaj realigi la ideon de Haick krei miniaturan diagnozilon, kiu rekonas je la komenco tumorspecojn. Haick profesoras ĉe la plej prestiĝa israela teknika altlernejo, Tehnion, en la urbo Hajfo.

AMik

Vizito al Takahaŝi

En la sud-japana prefektujo Okajama situas urbo Takahaŝi. En ĝi loĝas miaj Esperanto-amikoj gesinjoroj Miajatanj, kiuj invitis min kaj mian edzinon gastigi ĉe ili kaj ekkoni la vidindaĵojn de ties urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Profitante ilian afablecon, ni akceptis la inviton.

Alveninte al Takahaŝi, ni unue vizitis templojn *Jakuŝi-in-Sooren-ĵi* kaj *Raikjuu-ĵi*. La unua estas fama pro la 32a filmo el la japana televida filmserio de „Malfacila estas ja vira vivo”. Reĝisoro Jamada Jooĵi filmis tiun serion, konsistantan el 48 filmoj dufoje jare, ĝis la ĉefrolulo Acumi Kijoŝi mortis. Jamada tre ŝatis tiun urbon kaj li dufoje filmis en ĝi. Juna bonzo en la templo tre afable montris al ni fotojn pri la filmado.

Templo *Raikjuu-ĵi* estas fama pro sia japanstila ĝardeno, projektita de Kobori Enŝuu, kiu regis tiun regionon komence de la 17a jarcento. Li estis tre talenta homo en diversaj fakoj: arkitekturo, ĝardenado, teo-ceremonioj ktp. La ĝardeno en la templo konsistas el rokoj, sablo kaj arbustoj. En la sabla maro estas gru- kaj testud-insuletoj. Je la fono staras ondforme ĉirkaŭonditaj azaleoj kun ruĝaj floroj. Dum la pasintaj 400 jaroj oni zorgeme flegis la ĝardenon, por ke ĝi konservu sian originalan formon kaj belecon. Ĝi estas registrita kiel „Ĝardeno trezoro” en 1974. Sidante sur ĝia verando, ni meditis, kvazaŭ ni estus en la malnova tempo.

Feliĉe Takahashi ne suferis aeratakojn de bombaviadiloj de Usono dum la dua mondmilito. Tial malnovaj stratoj kaj konstruaĵoj tie estas plej konservitaj. Plu ekzistas ankaŭ

loĝkvartalo de samurajoj (japanaj militistoj). Multajn domojn oni jam rekonstruis kaj transformis en modernajn konstruaĵojn, tamen restis du domoj, kiuj prezentas la vivon de samurajo-familio. Ili estas lignaj modestaj domoj, konstruitaj antaŭ 170 jaroj, kun kelkaj ĉambroj por la familianoj, unu ĉambro por servistinoj, kuirejo, banejo kaj necesejo. Apud la pordo estas stalo kaj ĉambro por servistoj. En la malgranda ĝardeno oni plantis pinojn kaj kelkajn arbustojn. Tie ni ĝuis ankaŭ belajn kantojn de malgranda birdo ugvisio.

En Japanio lastatempe urbocentroj malviglas, ĉar ekde pluraj jaroj estas malfarmataj grandvendejoj ekster la urboj. Proksime al ili oni ekloĝas, forlasante malnovajn kvartalojn. Tamen Takahaŝi estas ĉirkaŭita de montoj kaj pro tio ne ekzistas vasta tereno ekster ĝi por konstrui grandvendejojn. Tial la urbo konservis tradician japanan etoson, kiu allogis reĝisoron Jamada kaj ĉiujare altiras turistojn. Takahaŝi estas modesta urbo, kaj ĝuste pro tio mi tre ŝatas ĝin. Ĝiaj kastelo, malnovaj stratoj, temploj kun belaj ĝardenoj, rivero kaj kompreneble agrablaj loĝantoj rememorigas la jam „perditan japanan etoson” de la pasinteco.

Hukija

Vilaĝo Hukija troviĝas je 20 km for de Takahashi. En la pasinteco ĝi estis fama pro la produktado de kupro kaj kolkotaro (ruĝa okro). Laŭ malnovaj dokumentoj, oni malkovris kupron en Hukija ankoraŭ en la jaro 807 post Kristo, sed la plej prospera epoko de kuproproduktado estis inter 1690 kaj

1930. Kolkotaron oni produktis en 1707 en la vilaĝo (por la unua fojo en Japanio). Ĝi estis uzata kiel glazuro por ceramikaĵoj kaj kiel farbo por lignodomoj kaj ŝipoj. Eĉ nun ĝi estas tre utila materialo por modernaj aparatoj kaj produktaĵoj. La vilaĝo tre prosperis pro ambaŭ produktadoj. Tamen ili ĉesis. Oni fermis la kuprominejon en 1972, kaj la kolkotaroproduktadon en 1974.

Unue ni vizitis Domon de kolkotara ceramikaĵo, kie artistino instruis ceramikadon al lokuloj kaj turistoj, uzante kolkotaron kiel glazuron. Nia gastiganto sinjoro Mijatani estas ŝia lernanto kaj en sia hejmo li konservas belajn ceramikaĵojn. Poste ni iris al la eksa kuprominejo. Ni povis imagi al ni, kiamaniere ministoj laboris tie en malbonaj kondiĉoj.

Hukija.



Ni trarigardis ankaŭ domegon de familio Hirokane. Kiam ni elaŭtiĝis en parkejo, ni estis konsternitaj de la kastelsimila konstruaĵo. Antaŭ niaj okuloj etendiĝis alta ŝtonmurego, sur kiu staris ligna domo. Komence de la 19a jarcento la familio ekposedis kupro- kaj kolkotarominejojn kaj ege prosperis. La domo estis konstruita en 1810. Antaŭ nelonge la familio donacis ĝin al urbo Takahaŝi, kiu konservas ĝin kiel valoran heredaĵon de la pasinta epoko.

En la centra parto de Hukija estas mallarĝa strato, kie staras domoj kaj vendejoj, konstruitaj en la 1a jarcento. Ĉiuj konstruaĵoj estas harmonie malhelruĝaj kaj kun kupraruĝaj tegoloj. Menciindas, ke la posedantoj de tiuj konstruaĵoj invitis ĉarpentistojn el la najbara regiono Sekiŝuu (nuna pre-

Kastelo Bitĉuu-Macujama.

fektujo Ŝimane) por elformi la straton laŭ unueca koncepto. Pro tio la strato iĝis tre ĉarma kaj harmonia. Ni vizitis ankaŭ elementan lernejon, konstruitan komence de la 20a jarcento. Ĝi estas tre belaspekta konstruaĵo, en kiu ĉi-momente nur 20 lernantoj lernas.

Jam krepuskis kaj malhelis, kaj en la strato nur du-tri vendejoj estis malfermaj. Ne videblis homoj. Ni sentis nin tristaj, rimarkinte, ke tiu strato estas jam mortinta. Multaj domoj jam ne estas loĝataj.

Kastelo Bitĉuu-Macujama

La sekvan tagon ni ekveturis bicikle al kastelo ĉe la pinto de monto Gagjuu-san, sed la vojo tien estis tro kruta. Tial ni devis lasi la biciklojn en parkejo meze de la monto kaj piediri supren. Kastelo *Bitĉuu-Macujama* staras ĉe la 430 metrojn alta montopinto. En 1240 ĉi tie estis konstruita la unua fortikaĵo, kaj poste oni riparigis kaj plifortigis ĝin. La nun ekzistantan kastelon konstruigis en 1684 tiama reganto Mizutani Katumune.

Kiam Japanio komencis modernigi en 1867, multaj kasteloj estis malkonstruitaj. Ankaŭ tiu kastelo havis la saman sorton de multaj aliaj, sed ĝi staris ĉe la montopinto tiel krute, ke tro malfacile eblis malkonstrui ĝin. Kelkajn ĉirkaŭajn konstruaĵojn sur ĝia tereno oni tamen malkonstruis, krome la ĉefa

parto de kastelo estis forlasita dum multaj jaroj.

En 1941 oni registris la kastelon kiel nacian trezoron. Dum la dua mondmilito multaj aliaj nemalkonstruitaj kasteloj, starantaj en la urbocentro forbrulis rezulte de aeratakoj de usonaj bombaviadiloj. Tamen tiu kastelo postvivis, ĉar ĝi sola staris en la montaro. Inter 1997 kaj 2003 ĝiaj pordegoj, muroj ktp estis rekonstruitaj, tiel ke ĝi reakiru sian antaŭan gloron. La kastelo ne estas tiel granda kiel aliaj en Osaka kaj Nagoja, sed ĝi estas tre bela pro la kontrasto de nigraj tegmentoj kaj blankaj muroj. Se ni estus en printempo aŭ en aŭtuno, ĉirkaŭus nin floroj de sakuro aŭ flavaj kaj ruĝaj folioj.

Tiun vesperon atendis nin alia ĝojo, nome tranoktado en *Motonakada-tei* – domo de riĉa komercisto-produktisto de riza vino, konstruita antaŭ 100 jaroj. La posedanto donacis la domon al la urbo kaj oni transformis ties magazenon en ok hotelĉambrojn. Vespermanĝe tie ni ricevis bongustajn manĝaĵojn, kuiritajn ĉefe el lokaj produktaĵoj.

La sekvan matenon iom pluvigis, sed la montetoj kaj rizkampoj aspektis multe pli belaj en sia frusomera helverd-koloro. Ni promenigis al la najbara sanktejo kaj plene ĝuis la kamparan etoson.

HORI Yasuo

La karaktero de la ĉina lingvo kaj la sekvoj por Esperanto



ROGER BORGES

Esperanto en la ĉina

La ĉina lingvo, eĉ nur ĝia sublingvo, la mandarena, estas la plej parolata lingvo en la mondo. Ĝiaj trajtoj larĝe distancigas ĝin de la hindeŭropaj lingvoj, el kiuj kvar – la angla, hind-urdua, hispana kaj rusa – rolas inter la plej parolataj lingvoj. Kontraste, la ĉina eĉ ne havas parencojn ekster Ĉinio, se oni ekskluzivas la birman kaj aliajn disputatajn tre malproksimajn parencojn. Tial ne estas surprize, ke Zamenhof bazis Esperanton sur la hindeŭropaj lingvoj – pli precize sur la eŭropaj. Ĉu, do, Esperanto taŭgas por la ĉinoj?

Pro (aŭ ĉu malgraŭ?) la ĉi-supraj faktaj leviĝis kritikoj kontraŭ Esperanto, pretendantaj, ke ĝi estas tro eŭropeca por ĉinoj, kaj tiun aserton mi en ĉi tiu artikolo volas ekzameni antaŭ ol konkludi, ke tiuj kritikoj estas nepravigeblaj.

Unue, ĉu estus eble, ke Esperanto estu konstruita tute neŭtrale per baziĝo sur, ekzemple, la kvin lingvofamilioj plej gravaj laŭ nombro de parolantoj, nome inkluzive de la lingvofamilioj al kiuj apartenas la lingvoj araba, malaj-indone-

zia, kaj tamila? Fakte estas, ke bedaŭrinde la strukturoj de tiuj lingvoj estas tutsimple neakordigeblaj inter si. Tia „Esperanto” plaĉus al neniu.

Tamen, ĉu Esperanto estus povinta almenaŭ eviti iujn nedezirindajn eŭropajn trajtojn? Pli specife, ĉu Esperanto estus povinta ion lerni de la ĉina? La jenaj temoj meritas pripensadon.

Ni prenu la nomojn de la monatoj kaj de la tagoj de la semajno. En la ĉina oni simple numeras ilin (sola escepto: dimanĉo). En Esperanto la ĉinoj devas lerni 19 apartajn, por ĉinoj tute strangajn, vortojn. Kaj kion diri pri la personaj pronomoj? La ĉina sistemo estas evidente pli simpla ol la esperanta. La pluralaj pronomoj estas regule formitaj per aldono de la sama sufikso. En Esperanto „vi”, escepte, eĉ ne havas apartan pluralan formon. Kial ne?

Pri kunmetitaj vortoj: la ĉina lingvo montras, kiel Esperanto povus esti evitinta multajn apartajn radikojn. En la ĉina ekzemple „hodiaŭ” estas „nuntag”,

„demokratio” estas „popolreg”, kaj „vulkano” estas „fajrmont”. Pro jama internacieco (kiu fakte ekskluzivas ĉinojn) Esperanto enlasis multajn apartajn radikojn tute nebezonatajn. Kial, ekzemple, „hemisfero”, kiam „duonsfero” tute taŭgas?

Ankoraŭ pri la nomoj de la monatoj: en granda parto de Ĉinio silabkomenco „l-” kaj silabkomenco „n-” estas alofonoj de unu sama fonemo, kaj estas malfacile por la tieaj ĉinoj distingi inter la du. Kiel bedaŭrinde, do, kaj ne nur por ĉinoj, ke en Esperanto ni havas la tro similajn „junio” kaj „julio” anstataŭ ekzemple „junio” kaj „juljo”. Kompreneble, por multaj ĉinoj ankaŭ „li” kaj „ni” prezentas problemon, sed estus neeble, ke ia ajn mondlingvo evitu entute tiajn bedaŭrindaĵojn (ekzemple, pensu nur pri la japana konfuzo inter „l” kaj „r”). Modifante la konatan proverbon, ankoraŭ nenio plaĉus al ĉiuj.

Sed laŭ mi la argumento favore al Esperanto klare superas la kontraŭan. Kial? Nu, por lerni ajnan fremdan lingvon, la ĉinoj frontas gigantan taskon, kompare al kiu lerni Esperanton, inkluzive de ĝiaj (de ilia vidpunkto) eŭropecaj difektoj, estas pluroble pli facile. Por la ĉinoj Esperanto malfermas pordon al la ekstera mondo, kiu estas plejparte eŭroplingva mondo. La eŭropeco de Esperanto ne malinstigas al la ĉinaj esperantistoj akcepti nian lingvon kiel ĝi estas, kion atestas la fakto, ke la ĉina Esperanto-movado estas inter la plej aktivaj.

Kian lecionon neĉinoj povus lerni el ĉi tiu afero? Nu, en korespondado kun ĉina plumamiko, almenaŭ vi prefere ne skribu „hemisfero”, krom se vi scias, ke hazarde li aŭ ŝi konas la grekan ...

Vilhelmo Rowe

Kredo kaj angla lingvo

La patro de abiturientino plendis al la koncernita instanco, ke dum ŝtata finekzameno de la angla lingvo la abiturientoj de Litovio ricevis la taskon priskribi la tagon de ĉiuj sanktuloj kaj kristnaskan vesperon (litove *Kučios*) kaj klarigi, kion tiuj festoj signifas por ili. Laŭ la opinio de la plendinto tiel estis subpremitaj la rajtoj de kredantoj de aliaj religioj kaj senmotive estis atribuita avantaĝo al katolikoj.

La taskoj en la ĉi-jara skriba ekzameno konsistis el du devigaj partoj: unue, formala letero, per kiu oni sin proponas por laboro eksterlande kaj, due, letero al eksterlanda amikino.

En la ekzamena tasko imagita amikino el Tajvano skribas, ricevinte kalendaron el Litovio, sur kiu ŝi rimarkis, ke Litovio havas festojn, kiuj en Tajvano ne estas konataj, kaj ŝi demandas: „Kian sencon havas tiuj festoj kaj kion ili signifas por vi?” La abiturientoj devis respondi al la demando per 140-160 vortoj.

Laŭ aserto de la plendinto, tiu tasko povas kontraŭi la konstitucion, kiu deklaras, ke ne eblas atribui avantaĝojn al iu ajn pro religio. En Litovio loĝas multaj, kiuj havas aliajn religiojn, kaj parto de la civitanoj entute ne estas religiemaj. Sekve, en la ekzameno aperis tasko, kiu havas signifon por nur parto de la litovoj – nome la katolikoj.

La aŭtoro de la plendo asertas, ke plenumante tiun ĉi taskon, la ceteraj abiturientoj frontis problemojn. Kvankam ekzemple, islamano aŭ ortodoksulo povis klarigi la sencon de la festoj, tamen estis dubinde, ke li povis indiki, kion ili signifas por li persone. Aliflanke katolikoj senprobleme povis respondi ambaŭ demandojn.

La estro de la parlamento de lernejoj Justas Plankis konfirmis, ke la ceterajn abiturientojn ĉi tiu tasko multe konfuzis. Por plenumi ĝin necesis speciala vorttrezoro, necesis antaŭe lerni,

kiel anglalingve esprimiĝas la ceteraj religiaj konceptoj. Por alireligiaj lernantoj tio estis malfacila afero.

Abituriento de lernejo de Vilniuso, Dmitrij Lemešov, konfesis pri sia konfuziĝo, kiam li ekvidis la taskon pri la kristnaska vespero kaj pri la tago de ĉiuj sanktuloj. Certe, li skribis, ke dum tiu tago oni vizitas la tombojn de proksimuloj, malgraŭ tio, ke ortodoksuloj tion faras ne dum la tago de ĉiuj sanktuloj. „Ni alimaniere festas tiujn ĉi festojn kaj malpli scias, kiel katolikoj festas ilin. En la ekzameno necesis priskribi multajn detalojn, pri kiuj mi ne sciis”, diris la junulo.

La afero kaŭzis diskutojn. La direktoro de la instituto pri sociaj esploroj, Arvydas Matulionis, indikis, ke por ŝtata maturiga ekzameno necesus eviti temojn, forte ligitajn kun la etna, nacia aŭ religia identeco de lernantoj, ĉar la ceteraj grupoj de la abiturientoj povas esti tikiĝemaj pri ili.

Dume psikologo Rasa Bieliauskaitė opinias, ke tiaj ekzamenaj taskoj ne


povis kaŭzi gravajn psikajn problemojn por personoj de aliaj religioj, se ili estas firme integritaj al la socio. Kaj abiturientoj ja estas tiaj.

La direktoro de la Ekzamena Centro, Vidmantas Jurgaitis, ne volis diskuti, ĉar li demisias.

Laimius STRAŽNICKAS



DARIUS MATULEVICIUS



DARIUS MATULEVICIUS

Mia estrino estas vampiro

Virino rakontis, ke en ŝia oficejo estas stranga estrino. Se oni komunikas kun ŝi dum tuta tago, vespere oni sentas sin tiel lacega, ke oni apenaŭ povas movi fingron aŭ konversacii kun familianoj. Se la estrino forestas, oni sin sentas tute vigla, malgraŭ ke laboro ĉiam abundas. Ŝajnas, ke en la oficejo oni absorbiĝas tiel, ke eĉ hejme malfacilas halti: la ĉiutagaj hejmaj laboroj bolas, la kontaktoj kun proksimuloj harmonias ...

Alia reagis aldonante, ke en ŝia malnova laborejo estis same. Koleginoj ĉion elprovis, inkluzive benitan akvon, diversajn surkolajn agrafojn, kiujn ili portas por preventi iun negativan influon ... Nenio helpis ĝis tiu virinaĉo translokiĝis en alian parton de la buroo.

„Certe tio estas tipa ekzemplo de vampirismo: malfortulo suĉas energion el la fortulo, kaj tiu ĉi suferas”

Ambaŭ virinoj decidis, ke ili havis kontaktojn kun tiel nomataj energetikaj vampiroj, kiuj suĉis ilian energion.

„Certe tio estas tipa ekzemplo de vampirismo: malfortulo suĉas energion el la fortulo, kaj tiu ĉi suferas”, – asertis la prezidanto de litova asocio de parapsikologoj bioenergetikisto Jonas Algimantas Dainauskas. Pri tia fenomeno li rakontis iom pli.

Vampiroj abundas

La tutlande konata bioenergetikisto substrekiis, ke la tuta homa ekzistado dependas de la stato de la bioenergetika strukturo, ni diru, la biokampo. Komunikante kun proksimuloj aŭ nekonataj personoj, tiu biokampo ofte difektiĝas. Unu el tiaj fenomenoj nomiĝas vampirismo. Tio ne ligiĝas

al Drakulo suĉanta sangan. Temas pri energiosuĉa vampirismo, kun kiu preskaŭ ĉiu kolizias en sia ĉiutaga vivo kaj eĉ ne ĉiam oni perceptas tion.

Se estas vampiro, devas esti ankaŭ donanto. Estas du personoj, kiuj rekte aŭ distance interkontaktas per siaj biokampoj: donanto fordonas sian energion kaj vampiro prenas ĝin.

Vampirismo povas esprimiĝi diversmaniere. La plej kutima estas natura fenomeno, ekvivalenta al la fizika principo de la interkonektitaj ujoj. Se en la familio estas lacegaj, malsanaj personoj, kies ceteraj bioenergetikaj strukturoj estas difektitaj, aliaj familianoj kun pli forta energetiko, senkonscie, fordonas sian energion al ili. En la familio tio estas memkomprenebla, ĉar unu ja helpas la alian. Tio estas mallongdaŭra efiko, krom se oni kunestas longe, ekzemple dum oni ripozas aŭ dormas.

Onidire tipa vampirismo en la familia medio estas reciprokaĵo riproĉoj

La bioenergetikisto spertis, ke foje juna familio plendas pri tio, ke post longa kunestado unu el la paro sentas fortan elĉerpiĝon. Onidire tipa vampirismo en la familia medio estas reciprokaĵo riproĉoj – „vi malbone kuiris”, „kial vi tiel malfrue revenis?” ktp. Donanto en la kirlo de familiaj kverecoj eĉ eksentas kulpon malgraŭ ke li/ŝi fordonas sian energion al la vampira partnero.

Al tiu ĉi grupo estas atribuida ankaŭ energia dispartiĝo inter infanoj kaj aĝaj personoj, ekzemple, geavoj. Foje tio eĉ kaŭzas problemon. Ja koro maljuniĝanta, malsana, strebas al „saviĝo” – suĉas energion de infanoj. Se tio estas longdaŭra, la infano povas ekmalsani. Tiu ĉi fenomeno estis konata jam antaŭ delonge. Apud soldato vundita en la milito kuŝiĝis junaj

fraŭlinoj, kiuj per sia energio helpis lin fortiĝi. Eĉ se ni tenas manon de la malsanulo, ni helpas lin saniĝi.

Pli danĝeraj vampiroj

La bioenergetikisto atentigas je pli danĝera vampirisma formo, kiu esprimiĝas per distanca energia suĉo, eĉ se la vampiro tion ne scias. Tio kutime rilatas al estroj. Kiu replikas al alia persono, aŭ ofendas lin, tia persono sentas kvazaŭ grandan alfluon de aldona energio. Tio ekzemple okazas, se la ricevanto de la furiozo ofendiĝas aŭ ekkolas ne malkaŝante tion, kaj rezulte suferas. Lia energio malfortiĝas, la fortoj lin forlasas, la humoro malboniĝas. Fojfoje povas okazi pli danĝera afero – difektiĝas la energetikaj centroj-ĉakroj kaj aperas ebleco de malsano.

Vampirismo riviĝas ne nur inter individuoj, sed ankaŭ inter diversaj grupoj, ekzemple, inter politikaj partioj, kiuj enteniĝante al reciproka batalo, insultas unu la alian.

Vampirismo ankaŭ povas havi formon de polpo kaj realiĝi en skalo mond vasta, kiam spacaj strukturoj nutriĝas per minaco, kolero, doloro. Tiu ĉi formo regas precipe en amasko-munikiloj.

Evidentiĝas, ke ekzistas ankoraŭ unu vampirisma fenomeno, vere iom stranga. Dum akra konflikto iam ekinta la energetika ligo inter du personoj – vampiro kaj donanto – povas konserviĝi dum longa tempo kaj ligi ambaŭ per nevidebla energetika ŝnureto, eĉ, ekzemple se unu troviĝas en Kaunas kaj la alia – en Novjorko. Iom post iom la donanto elĉerpiĝas, kaj la energio, kiun elsuĉas la vampiro, malfortiĝas. Je malsano de la donanto, ankaŭ la vampiro ekmalsanas, eĉ ambaŭ povas morti en simila periodo.

Laŭ aserto de la bioenergetikisto unu el la plej interesaj novtipaj vampiraj fenomenoj estas tiu, pri kiu la

***Unu el la plej interesaj
novtipaj vampiraj
fenomenoj estas tiu,
pri kiu la homoj ofte
eĉ ne konscias.***

homoj ofte eĉ ne konscias. Ĝi ekas tiam, kiam en siaj mensoj aŭ konversacioj oni memoras pri iamaj insultoj, eĉ pri iamaj donacoj. Tiukaze subite deformiĝas la ceteraj bioenergetikaj strukturoj. Tiel la homoj povas vampirigi sin ankaŭ memstare, se ili senĉese memoras pri sia malfacila pasinteco, ne povas fortiri sin de ĝi, blokiĝas en siaj pensoj.

Kiel helpi sin?

Kion konsili al la persono, kiu sperdas atakon de vampiro? Luj proponas blokigi sin, aliaj – komuniki kun tia persono, interkrucigante manojn aŭ piedojn, kovri la vizaĝon per ajna objekto, ekzemple, per mansaketo aŭ kartonteko, imagi inter la duopo akvofalon aŭ brikan muron. Ankaŭ estas homoj, kiuj helpon serĉas ĉe bioenergetikistoj por ke ili „riparu” la difektitan biokampon.

La bioenergetikisto asertas, ke por vampiroj la plej efika armilo estas malobeo al iliaj emocioj, kolero, kiu fojfoje riveliĝas kvazaŭ provoko. „Memoru, ke energetikajn difektojn kaŭzas ne la atakinto sed nia reago. Senĉesaj plendoj pri sia destino, mizero, sano povas fariĝi danĝeraj dum rekta aŭ eĉ dum telefona konversaciado. Ili vampiras. Se vi profundiĝos en la problemoj de la vampiro, rezulte vi povas esti elsuĉita. Gravus eviti emocian plonĝon en la problemojn de aliaj”, – klarigis la bioenergetikisto kaj li aldonis, ke se vi sur via vizaĝo metos senkulpan rideton, furioza kaj kolera vampiro eĉ povas sperti koratakon.

La bioenergetikisto Dainauskas rimarkigis, ke difektita biokampo ofte ripariĝas memstare tuj, kiam oni forlasas la vampirigan geopatogenan zonon, ekzemple, el la hejmo iras al la laborejo aŭ inverse. Aliokaze estas necesaj tri aferoj: pura koro, serena menso kaj kapablo pardonpeti. Tion tuforte ĉiu necesus praktiki.



La bioenergetikisto Dainauskas asertas, ke energetikaj vampiroj abundas ĉie.

Radioteknika sperto

La 65-jaraĝa litova bioenergetikisto rakontis, ke ofte lin vizitas deprimitaj inoj. Ofta kialo estas iliaj drinkemaj edzoj. Helpon serĉas ankaŭ gravaj malsanuloj.

La viro diris, ke ne ĉiufoje necesas viziti lin. Li povas helpi ankaŭ distanĉe, ekzemple, se oni sendas foton per retpoŝto. Sur lia tablo videblas nur kandelo, ilo por mezuri biokampan intensecon, kristalo regata per la menso de la bioenergetikisto kaj kelkaj biogeneriloj, kiuj povas doni energion kaj protekti kontraŭ danĝera minaco de la ĉirkaŭo.

La bioenergetikisto neas, ke li anstataŭas kuraciston. Li estas nur saniganto, helpanta detiriĝi de malsanoj. Foje eĉ kuracistoj rekomendas helpon de bioenergetikistoj. La bioenergetikisto asertas, ke li akceptas ĉiukaze, sed postaj agoj dependas de la respondoj

***„Foje okazas, ke mi povas
(helpi) sed ne indas”***

al tri demandoj, kiujn li ĉiam stargas antaŭ si: ĉu mi povas labori, ĉu mi povas helpi kaj ĉu indas helpi? „Foje okazas, ke mi povas sed ne indas”, – iom enigme klarigis la viro.


La viro, kiu nun okupiĝas pri bioenergetiko, antaŭe prelegis en politeknika instituto de Kaunas. Lia fako estas radiotekniko. En la instituto li profundiĝis en kosmajn programojn, kaj esploris la sekretojn de la t.n. „nigraj skatoloj” de aviadiloj. Kiam li ŝanĝis sian fakon al la alia – korpokultura –, li penis kombini siajn radioteknikajn sciojn kun konstatoj faritaj en fizika korp-esplorado. Tio gvidis lin al ekstersensaĵoj kaj helpis trovi solvojn pri multaj misteraj fenomenoj.

Laimius STRAŽNICKAS

PILGRIMADO

Pedalante al Jerusalemo

WAYNE MCLEAN



Pilgrimuloj ili estis, certe, kaj ankaŭ provizitaj per moderna armilo, nome *biciklo*. Kunveninte el diversaj landoj, ili renkontiĝis en Milano por dudek ses etapoj, tri mil kvincent kilometroj, tridektaga biciklado. Estis grupo bicikle pilgrimanta, kiu en sia vojaĝo tra pluraj landoj esperis postlasi ĉie survoje, sed precipe ankaŭ en la celataj regionoj de Israelo kaj

Palestino mem, sian pac-mesaĝon, kiu enhave estas identa kun la pac-mesaĝo, kiu unuafoje estis anoncita ĝuste en tiuj partoj de la mondo.

Fine de julio 2006 ili foriris el Milano, pedalis tra la *Sankta Vojo de la Longobardoj* ĝis Brindizo por tie enŝipiĝi. Post elŝipiĝo ĉe Ĉesme en Turkio, sekvis traŭro tra interna Anatolio, laŭ Efezo, Tarso kaj Antioĥio, la urbo, kie unuafoje la sekvantoj de Jesuo ricevis la nomon kristanoj. Sekvis Sirio kaj Jordanio.

Okazis survoje multaj haltadoj kaj renkontiĝoj en komunumoj de miksitaj religio kristana-islama, kaj ĉie sonis la sama mesaĝo, kiun ili donis kaj ricevis! Fascina halto, interalie, estis tiu sur la monto Nebo, fama pro Moseo, kaj en Madaba', fama pro la tieaj frukristanaj arkeologiaĵoj.

Fine de aŭgusto, dum ankoraŭ unu israela-hezbola milito, sub mirantaj rigardoj la biciklanta karavano eniris la celitajn teritoriojn, atingis Israelon kaj vizitis la Sanktan Tombon, kie loka gardisto-ĉiĉerono kuraĝigis ilin daŭrigi sian paco-anoncadon per pilgrima vizito al la Sanktaj Lokoj!

Armando ZECCHIN



Kial la malestimo je la afrika medicino?

Yvette Parès estis diplomita en la fako bakteriologio kaj serologio en la Universitato de Liono en Francio, poste ŝi dediĉis sin al laboratoria esplorado kaj doktoriĝis pri mikrobiologio. Poste ŝi akiris medicinan diplomon kun la celo kombini siajn bakteriologiajn studojn kun la praktika kuracado de pacientoj, ĉar ŝin frapis la grandega distanco inter sciencistoj, laborantaj en laboratorioj, kaj ĝeneralaj kuracistoj, kiuj devas peri la medicinon al realaj homoj.

Delonge Yvette deziris ekkoni Afrikon, kaj en oktobro 1960 posteno en la Scienca Fakultato de Dakaro, en Senegal, fariĝis vaka, tiel disponigante al ŝi eblon, salajrate, sperti esploradon en Afriko. En 1968 alvenis neanticipita oportuno: en la Universitato de Dakaro (kie Yvette poste fariĝis profesoro) la medicindirektoro proponis al ŝi, ke ŝi esploru lepron. Tiutempe oni sciis, ke lepron kaŭzas la bacilo *Mycobacterium leprae*, sed ĝis tiam neniu sukcesis kultivi tiun bacilon en laboratorio, por ebligi detalajn studojn pri ĝi kaj precipe por ebligi eksperimentojn, celantajn nuligi ĝian kreskantan reziston al antibiotikoj, kaj, pli grave, efektiviĝi ian vakcinon, kiu protektos la homojn kontraŭ lepro. La vakcino ne efektiviĝis, sed longa pena eksperimentado, fine, ja ebligis trovi nutromedion por laboratorie kultivadi la bakterion.

Kvankam antibiotikoj trovataj aŭ sintezataj en la okcidentaj landoj povis iom efiki kontraŭ la lepra bacilo, ilia kosto, kaj nedezirindaj flankefikoj, dezirindigis trovi novan medikamenton, por kontraŭbatali lepron. Ĉu eble inter la indiĝena flaŭro afrika, ankoraŭ preskaŭ tute ne studita de medicinaj specialistoj, troveblas natura antibiotiko, kapabla inhibi kaj detruigi la bacilon? Almenaŭ por Senegal, kie lepro estis

abundega, tia trovo estus kvazaŭ disendita miraklo.

Sed necesus ekzameni detale centmilojn da indiĝenaj vegetaĵoj afrikaj – herkula tasko, neebbla por malgranda medicina fakultato de universitato. Ĉu neniu antaŭ nun akiris spertojn pri la karaktero de medikamentoj, bazitaj sur afrikaj kreskaĵoj? Nu jes, kvankam sciencistoj okcidentlandaj ne emis konsideri ilin: la tradiciajn medicinistojn de Afriko.

Laŭ la kutima vidpunkto en Okcidento, tradiciaj medicinistoj afrikaj estis rigardataj kiel ŝamanoj, sorĉistoj, eĉ ĉarlatanoj, kiuj kunmiksas superstiĉojn, religiajn tradiciojn, trancojn, esoterajn ritojn kaj plantaĵojn, do apenaŭ sciencistoj raciaj kaj fidindaj. Ĉu tiu okcidentlanda antaŭjuĝo estas prava? Yvette Parès decidis, ke, se ekzistas ia ajn espero trovi fideblajn informojn pri la medikamentefika karaktero de la indiĝena flaŭro, necesos trovi neĉarlatan, tradician specialiston, kapablan (kaj volantan) inici ŝin en la misterojn de la medikamenta uzado de afrikaj plantoj.

Tian specialiston ŝi fine trovis. Li, tamen, multe malsimilis la okcidentulan karikaturon de indiĝena kuracsorĉisto. Li akceptis inici ŝin en la tradician kuracarton, avertante, ke ŝi devos multege studi kaj praktikadi por trovi efikaĵojn kaj ilin pretigi por praktika uzado. Certaj partoj de difinitaj plantoj kapablas influi febron, helpi vundojn resaniĝi, mildigi dolorojn ktp. Tamen necesas ne nur trovi, sed ankaŭ prilabori tiujn plantaĵojn, por ekstrakti la efikaĵojn, kaj, tre grave, profunde studi la dozologion, propran al ĉiu individua medikamentaĵo. Tasko multjara, kaj provado de la efikoj de diversaj medikamentaĵoj je lepruloj en la reala vivo, ne nur en la laboratorioj,



estus nefacila, se eĉ teorie ebla.

Lepruloj abundis, sed ĉu iuj el ili akceptus esti prieksperimentataj per afrikplantaj derivaĵoj kaj ekstraktaĵoj? Manpleneto troviĝis, sed kie fari la praktikan provadon? Necesas konstante akiri specifajn plantojn, ilin prilabori (longedaŭra kaj ofte delikata tasko), loĝigi la pacientojn, kaj, tre grave, iel eviti atakadon fare de najbaraj homoj, kiuj timegas la apudeston de lepruloj.

Post kelkaj malsukcesoj, loko troviĝis. Kompreneble, mankis elektro, akvoprovizo (escepte de kelkaj malnovaj putoj), transportiloj, komunikiloj; kaj la trovitaj loĝejoj estis malnovaj, riparendaj, por ebligi ilian uzadon. Ke mankis ankaŭ mono kaj oficialaj permesoj, estis neeviteble. Tamen Yvette Parès kun la specialisto pri indiĝenaj medikamentaĵoj kaj grupeto da lepruloj entreprenis establi kliniketon. Kelkaj lepruloj ankoraŭ estis sufiĉe fortaj por povi helpi al Yvette kaj la specialiston rilate al kuirado, flegado de malsaneguloj, elserĉado de taŭgaj plantoj kaj la malfacila prilaborado de la plantoj por akiri la efikaĵojn el ili.

Dum pasis la jaroj, la kliniketo kreskis, fariĝis grandskala, oficiale ►

► nomiĝis la Tradicia Hospitalo de Keur Massar. Tri-kvar aliaj terapistoj aliĝis al la specialistaro. En 1994 elektraj dratoj atingis la hospitalon, en 1995 telefoninstalaĵo ebligis, en 1996 eĉ fluanta akvo alvenis. Kaj iom post iom akiriĝis kelkaj veturiloj. En 2000 okazis la dudeka datreveno de la establiĝo de la kliniketo.

Intertempe aidoso fariĝis la ĉefa sanproblemo. Kaj rekomenciĝis la strebo trovi kuracmedikamentaĵojn indiĝenajn. Kiel ni ĉiuj scias, ĝis nun neniu trovis veran solvon por la aidosa pandemio.


La ĉi tie pridiskutata libro estas kroniko pri la laboroj de Yvette Parès, la problemoj, kiujn ŝi renkontis, la provo solvi tiujn problemojn. Kiam mi unue vidis la libron, kies koloroplena kovrilbildo tre mallogis min, mi preskaŭ ektimis legi ĝin. Sed komencinte la legadon, mi trovis klaran kaj, eble surprize, literature bonkvalitan kronikon, kies neformala stilo kaj humana karaktero multe entuziasmigis min. Libro pensiĝa.

Donald BROADRIBB

Yvette Parès: *La afrika medicino, mirige efika*. El la franca tradukis Jacques Roux. Eld. Kava-Pech, Dobřichovice, 2006. ISBN 80-85853-89-2. 199 paĝoj gluitaj.

Prezo ĉe FEL: 14,25 eŭroj + aŭfranko.

Irigo vin tra intrigo vintra



Restas malmultaj verkoj de Ŝekspiro tradukendaj esperanten. Inter tiuj estis *La vintra fabelo*, unu el liaj malfruaj dramoj, verkita en ĉirkaŭ 1610. La verko koncernas la reĝajn familiojn de Sicilio kaj Bohemio kaj estas bazita sur la proza rakonto *Pandosto*, verkita de Robert Greene en 1588, kun aldona influo el greka mitologio.

La tradukinto donas tre bonvenan enkondukon, kiu ne nur resumas la intrigon, sed lokas la verkon en la riĉan gamon de la tuta verkaro de Ŝekspiro. Ĝi klarigas, ke ĉi tiu verko, same kiel la samtempe verkita *La tempesto*, esploras la rilatojn inter arto kaj naturo, kaj pli specife inter la homa naturo kaj edukado. La sezonan aludon de la titolo oni interpretu metafore. Komence la vivo de la protagonistoj estas en ordo; sekvas ĵaluzo, akuzo, forfuĝo, tragedio, misimagoj, surprizoj kaj suferoj – tio estas la vintro – sed fine justeco triumfas, eraroj estas malfaritaj, miskredintoj pentas, restariĝas harmonio kaj ĝojo. Tia ciklo respureblas en pluraj ŝekspiraj verkoj, ĉu komediaj, ĉu dramaj.

La kvin-akta verko estas inter la pli malfacile tradukeblaj. Defio estas traduki tiom komplete kaj fidele al la originalo, kiom eblas, sen perdi la esencan ritmon kaj elanon, kiu nepras por sukcesa enscenigo. La traduko ne uzas neologismojn, kaj obskuraj vortoj raras. Tamen ne tro simplas kapti la enhavan sencon kaj riĉecon sen plurfoja legado. Tiusence, la traduko fidelas al la originalo! loma piednotado necesas por averaĝaj legantoj; bonvene tio ĉeestas.

La vortuzo en la angla originalo ne estas tre malfacila – Ŝekspiro ja verkis por la popolo – sed la signifoj estas densaj kaj multtavolaj. Kompreneble, iuj arĥaikaj vortoj tie troveblas, kaj aliaj anglaj vortoj ŝanĝis siajn signifojn aŭ uzmanierojn tra la intervenintaj jarcentoj, pri kio ne ĉiu nuntempa leganto konscias. Tial eblas pretendi, ke la verko fariĝas pli alirebla en sia esperanta traduko ol per la angla originalo, eĉ por denaskaj anglalingvanoj sen aparta literatura aŭ lingvistika fono!

Stefan MACGILL

William Shakespeare: *La vintra fabelo*. El la angla tradukis Humphrey Tonkin. Eld. UEA, Roterdamo, 2006. 156 p. ISBN 92 9017 091 3.

Prezo ĉe FEL: 14,00 eŭroj + aŭfranko.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Tlf. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato
aŭ per www.retbutiko.net.



Sekretoj de la konfesejo

(El la Analoj de Bailenambeann)

Unu el la plej respektataj loĝantoj de Bailenambeann estas Gobnait Malone. Je la 70a datreveno de ŝia naskiĝo, ŝiaj kuncivitanoj organizis por ŝi apartan akcepton, dum kiu kelkaj eminentuloj kaj multaj geamikoj omaĝis ŝin per longaj, sed sinceraj oratoraĵoj, en kiuj ili laŭdis ŝiajn abundajn servojn al la komunumo. Kompreneble, kiel ĉiam en tiaj okazoj, oni iom tro multe drinkis kaj manĝis. Gobnait mem estis kortuŝita, sed samtempe embarasata, ĉar tian regalon ŝi ne atendis nek deziris.

Gobnait estas emeritiĝinta flegistino. Multajn jarojn ŝi pasigis laborante en malsanulejoj en Irlando, Anglio kaj precipe en diversaj arabaj landoj. En tiuj tempoj, la postuloj de la islamaj leĝoj en Saŭda Arabio kaj en la ŝtatoj de la Persa Golfo estis eĉ pli rigoraj ol hodiaŭ. Kiel ĉiuj virinoj, Gobnait ne rajtis eliri el la hospitalo aŭ el la staba loĝkvartalo sen kovri per longa nigra vestaĵo sian tutan korpon, krom la okuloj, kaj sen akompano de iu membro de la vira sekso. Tiujn leĝojn ŝi senplende obeis. Ŝi sentis sin pli feliĉa en tiaj limigaj kondiĉoj ol iu vira kolego – giganta blonda, bluokula aŭstraliano, kiu timis viziti la urbon sen esti protekte eskortata de unu el la etaj flegistinoj aŭ doktorinoj kun kiu li deĵoris. En tiu epoko (espereble malkiel nun) junaj araboj havis neniun okazon, ekster siaj familioj, vidi aŭ renkonti junulinojn, do kompreneble suferis de konstanta seksa frustracio. Do, ĉiufoje kiam la aŭstraliano provis eliri sen ina akompano, li devis suferi pinĉadon, tuŝadon kaj similajn malagrablaĵojn per la manoj de sekse soifantaj viroj. Finfine, li rifuzis forlasi la malsanulejon sola. Kontraste, la virinaj stabanoj ne estis

persekutataj, kondiĉe ke ili respektis la regulojn de la ŝaria leĝo.

Kvankam ŝi neniam edziniĝis, danke al sia profesia laboro kaj siaj spertoj en tiom da landoj kaj inter tiom da diversaj popoloj, Gobnait havas profundan konon de la trajtoj, kutimoj kaj ekscentraĵoj de la homaro. Plie, kvankam irlanda katolikino, ŝi estas tre malpruda kaj povas rakonti multajn iomete maldecajn anekdotojn. Tian malnaivan sintenon vid-al-vide al la homa socio ŝi lernis tre frue. Ŝia edukado pri la mondo komenciĝis, kiam ŝi estis nur sepjaraĝa knabino kaj devis fari sian unuan konfesion. Fakte, en tiu tenera aĝo, ŝi havis neniun pekon por konfesi, sed ne volis ŝajni infaneca aŭ desa-

ponti la pastron, kiu, kiel ŝi bone sciis, devis gajni sian panon ĉiutagan per religiaj servoj kaj sakramentoj. Cetere, ŝi deduktis el siaj katekismaj klasoj, ke sen pekoj ŝi ne povis ricevi absolvon, kaj sen absolvo ŝi ne povis forlasi la preĝejon kaj aĉeti sian kutiman sabatan glaciaĵon. Do ŝi decidis inventi gravan pekon. Ŝi konfesis al la sacerdoto, ke ŝi ŝtelis ŝilingon el la monujo de sia patrino. La pastro estis tre severa. Li postulis ke ŝi diru sep Saluton-Mariajn kaj redonu la monon al la panjo, repagante ĉiusemajne unu pencon el sia poŝmondo, ĝis atingi la totalan sumon de unu ŝilingo. Kiam ŝi refoje faris konfesion, ŝi rakontis al la pastro, ke ŝi jam repagis el sia ŝparmona porketo ►

ROSA JIMÉNEZ CANO



Abonhelpa Fonduso

En 2006 la legantoj de MONATO donacis 51 senpagajn abonojn al legemuloj en landoj kun malforta ekonomio, nome en Armenio, Benino, Burundo, Ĉilio, Ĉinio, Ganao, Irano, Kongo (D.R.), Kongo (okc.), Kubo, Madagaskaro, Nepalo, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo, Pakistano, Panamo, Rumanio, Serbio, Taĝikio, Tajlando, Tanzanio, Togolando, Tunizio, Ugando, Urugvajo, Uzbekio kaj Vjetnamio. Sed restas ankoraŭ aliaj, kiuj dezirus legi MONATON sed ne kapablas pagi. Helpu al ili kaj subtenu la Abonhelpan Fonduson!

Sendu kiun ajn sumon al FEL aŭ al via kutima peranto, kun la mencio "Abonhelpa Fonduso de MONATO".

Se vi pagas la egalvaloron de unu abono aŭ pli, vi povas ankaŭ ekscii, kiu ricevis la abonon, kiun vi donacis, kaj eble ekkorespondi kun "via" leganto. Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevontoj tre sinceran dankon!

► la ŝilingon al sia patrino. Kompreneble, ĉar ŝia unua konfeso ne estis vera, ankaŭ la dua malveris.

Ŝi surpriziĝis kiam, dum la religia klaso en la lernejo, la instruisto parolis pri mensogado kaj klarigis, ke ĝi estas grava peko. Antaŭe Gobnait ne estis konscia pri tio, kvankam ŝi sciis, ke la gepatroj preferas, ke oni ĉiam diru la veron. Sekve, je ŝia tria fojo en la konfesiĝo Gobnait devis konfesi, ke nek la ŝtelado, nek la repago iam okazis. La pastro montris sin ŝokita. Mia infano, mensogi estis granda peko. Kiel pentofarado diru dek Saluton-Mariajn kaj dek Patro-niajn.

En tiu momento, Gobnait unuafoje konstatis, ke la homoj estas ne nur maljustaj, sed ankaŭ mallogikaj, konfuzitaj kaj absurdaj. Laŭ ili, ne konfesi estas peko, sed konfesi ankaŭ estas peko. Ŝia konkludo: la plenkreskuloj estas senspritaj idiotoj. Plie, la plimulto da ili estas tute senhumuraj. En la lernejo, la monaĥinoj, kiuj tie instruis, konstante avertis siajn malgrandajn lernejaninojn kontraŭ la teruraj seksaj tentoj kaj danĝeroj, kiujn ili alfrontos en la vivo. Precipe la knaboj kaj viroj prezentas okazojn por gravegaj pekoj, kaj estas nepre evitendaj. Tiuj faktoj sugestis al la seĝaraĝa Gobnait pli interesajn pekojn por konfesi. Do iutage, ŝi konfesis al sia konfesprenanto, ke dum la meso ŝi rigardadis la nukojn de la knaboj sidantaj sur la benko antaŭ ŝi, admirante la linion de ilia hararo. La pastro supozis, ke tio estas atestaĵo de la unua ekaperado en la vivo de la infano de unu el la plej gravaj tentoj, nome la seksa. Li faris longan disertacion pri la diversaj formoj, kiujn la seksaj pekoj povas alpreni: volupto, masturbo, malĉasto, adulto, ktp. Kompreneble, la vero estas tio, ke Gobnait, al kiu mankis ankoraŭ sufiĉe da jaroj por atingi la statuson de adoleskulo, tute ne interesiĝis pri la knaboj, kiujn, kiel ĉiu normala etulino de ŝia aĝo, ŝi fervore malamis kaj malestimis. Ties nukoj kaj hararo malpli allogis ŝin ol la vermoj kaj limakoj en la ĝardeno.

Do, refoje, ŝia konfeso estis malsincera kaj malvera. Pro tiu pruvo, ke la plenkreskuloj estas hipokritaj kaj malinteligentaj (kaj pro diversaj aliaj motivoj), en postaj jaroj Gobnait estas tre kontenta, ke ŝi ne edziniĝis.

Verdire unufoje, kiam ŝi estis juna virino, ŝi amikiĝis dumtempe kun junulo, sed nur ĉar li posedis motorciklon, kaj ĉiu juna virino scias, ke rajdi sur motorciklo estas multe pli ekscita ol amoro. Geedziĝo estas alia afero, precipe kiam ĝi implicas, ke la edzino devas dum la tuta vivo toleri la komppanion kaj stultecon de ununura viro. Ŝi scias, ke la virinoj ofte faras kaj diras stultaĵojn, sed al la plimulto de la viroj tute mankas saĝeco kaj prudento. Ŝi ĝojas, ke ŝi neniam sentis emon kundividi sian vivon kun ano de tiuj nekonsekvencaj kaj libida sekso. Sen edzo, ŝia mono apartenas sole al ŝi; ŝi estas libera; ŝi povas vojaĝi kiom kaj kien ŝi volas, fari ĉion kio venas al ŝi en la kapon; kaj fajfi pri la opinioj de aliuloj. Kiel flegistino, Gobnait neniam gajnis grandan salajron, krom dum mallonga tempo kiam ŝi laboris en Saŭda Arabio, sed ŝi sufiĉe multon ŝparis dum la vivo por povi ĝui senzorgan emeritiĝon. Pri malsano kaj medicino Gobnait kredas, ke ŝi ofte scias pli ol la kuracistoj en Bailenambeann. Kvankam maljuna, ŝi malofte malsaniĝas. En ĉi tiu momento ŝi partoprenas kurson pri ekologia teologio, ne pro pia motivo, sed ĉar ŝi trovas la dogmatikan parton de la studo kaj la bizarajn kunstudentojn ege humuraj. Ŝi estas malgranda virino, loĝas en malgranda domo, kondukas malgrandan aŭtomobilon, kaj havas kiel kunulinon etan kaj sufiĉe maljunan hundinon, kiu nomiĝas Fifi. Sume, ŝi estas kompleta persono. Do, se oni bezonas konsilon pri la sano, humuran senpezigon, aŭ bonan komppanion, pli bone estas pasigi du-tri horojn kun ŝi ol malŝpari la tempon kune kun puce ornamitaj ventkapaj junaj ĉarmuloj.

Albisturo KVINKE



Kontribuojn por la rubriko *Noveloj* de MONATO kunlaborantoj sendu al novelo@monato.net.

ANONCETOJ

...**jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemple-ro. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko? Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe www.retbutiko.net.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespond-amikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
lk@free.fr

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0295-6987

LA GAZET

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

gazeto@aol.com

<http://www.lagazeto.com>

Antverpeno festas pro 100-jara ekzisto de la klubo «La Verda Stelo» per INTERNACIA RENKONTIĜO

PROGRAMO : Elektebleco el paralelaj programoj:

- ✦ Prelegserio «Kulturo de la Kluba Vivo» kun diskuteblecoj
- ✦ Kunveno de Kunlaborantoj de Vikipedio
- ✦ Turisma programo:
 - «Esploru Antverpenon» pere de gvidataj vizitoj
- ✦ Vesperaj programoj :
 - Sabato 26/05/07 - JOMO
 - Dimanĉo 27/05/07 - Popolmuziko kaj dancado en Moderna Vesto.
- ✦ Festaj manĝoj
- ✦ Tranokteblecoj ĉe Esperantistoj kaj en 3 kategorioj de hoteloj

**Jam nun notu la
daton en via agendo
Pentekosto:
26, 27 kaj
28/05/2007**

**Petu la alsendon de faldfolio kun detaloj ĉe: Esperanto-Antwerpen@esperanto.be
aŭ rigardu : www.geocities.com/esperanto_antwerpen**